

Emanuel Geibel,

## Migrado

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Nun Majo alvenis,  
Burgonas la arbar',  
Do restu en hejmo,  
Filistra homar'!  
La nuboj ĉe ĉielo  
Migradas jam for,  
Laŭ ili nun fortiras  
Min la migrama kor'.

2. Nu, patro, patrino,  
Adiaŭ nun al vi,  
Feliĉon ekstere  
Serĉadas nun mi,  
Ja, multe da vojoj  
Ne vidis mi jam  
Kaj multe da bonvino  
Nur konas mi laŭ fam'.

3. Antaŭen, antaŭen  
Dum hela sunradi',  
Trans montoj, trans valoj  
Kun vigla energi'!  
La fontoj murmuras,  
Bruigas arbojn vent',  
La koro kun alaŭdo  
Kunkantas pro kontent'.

...

4. Vespere en urbeto  
 Gastigos min trinkej':  
 "Ho, mastro, nur vinon,  
 Sed de bongusta plej!"  
 "Ekprenu gitaron,  
 Gajega muzikant'!"  
 "Prikantos mi knabinon,  
 De kiu mi amant'."

5. Se mankos restejo  
 Kun noktripoz' kaj vin',  
 Sub ĉielo mi kuŝos,<sup>3</sup>  
 La steloj gardos min,  
 Bruanta tilio  
 Lulados al dormad',  
 La matenruĝo vekos<sup>4</sup>  
 Denove al migrad'!

6. Migrado, migrado  
 Libera ĝojo vi,  
 En brust' freŝe blovas  
 La spiro de Di',  
 La koro ĝojegas  
 Por la ĉirkaŭa rond',  
 Ke vi do estas bela,  
 Ho, vasta, vasta mond'!

...

---

<sup>3</sup>Rimarkigo de Manfred Retzlaff: En la "Esperantista Kantaro", el kiu mi la tekston detajpis. la linio tekstis: Sub ĉielo min kuŝos. Sed tio verŝajne estas pres-eraro.

<sup>4</sup>Ŝanĝpropono de Manfred Retzlaff: La matenruĝ' min vekos

*Traduko de la Germana poemo "Der Mai ist gekommen" de Emanuel Geibel en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919).*

*Arg-235-466 (2006-05-07 20:51:04)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro "Esperantista Kantaro", Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.*